

7-a JARO, N-o 321

LEIPZIG, 27. / 11. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

NACIISMO – INTERNACIISMO

Pro la ĥaoso, en kiu baraktadas la mondo, nun k jam de longe, multaj estas tiuj, kiuj serĉas rimedojn por iom ordigi la rilatojn inter la homoj. Klasbatalo en ĉiu aparta lando, milito inter diversaj regnoj, k pli vaste — inter imperiismoj. Milito, ĉu per armiloj, ĉu per dogan-impostoj. Jes, multaj serĉas iun solvon . . . Sed rimarkinda estas la fakto, ke eĉ la plej reakciaj politikuloj agnoskas la neceson de *internaciaj* kontraktoj. Ne plu ekzistas iu civilizita homo, kredanta je eblo de izola vivado por iu homo k plie por iu regno.

El tio rezultas, ke pli malpli ĉiu estas internaciisto! K-do leganto ne jam ekscitiĝu aŭ ne kredu, ke mi ŝercas: se la kontraktoj inter nacioj ne konsistigas la tuton da internaciismo, almenaŭ ili estas ero da ĝi. Certe vi prave refutos, ke la elcento de ĉiu likvaĵo konsistiganta iun likvoron, havas gravan influon sur ĝiajn bonojn aŭ malbonojn. Pro tio ni diru, ke la miksaĵo el naciismo k el internaciismo, kiu konsistigas la spiriton de ĉiu el ni, des pli valoros, ju pli ĝi enhavos da internaciismo.

Konstato facile farebla estas, ke tiu lasta plifortiĝas ĉiutage: ĝi trafas nun homojn aŭ sociajn organizojn, kiuj ĝis tiuj lastaj jaroj defendis sin kontraŭ ĝi plej sukcese. La premo de la realo puŝis ilin al tiu vojo.

Tion pruvas la raportoj faritaj ĉe Nacia Ekonomia Konsilantaro (Francio). Ĝi ne estas leĝopova, ĝi enketas, kolektas dokumentojn k poste konklude proponas rimedojn al la politikaj instancoj. Ĝia agado estas plej ofte senefika, ĉar ĝi estas miksaĵo el burĝoj k el laborist-reformistaj gvidantoj. Tamen la raportoj montras, kien direktiĝas k kiel evoluas la spiritoj.

Pri tio tre trafa estas la raporto de l' ĝenerala sekretario de Konfederacio de agrikulturaj asocioj.

La demandoj estis: a) Kiuj estas en ĉiu lando la terkulturaĵoj troproduktataj? b) Kiuj estas la normalaj vendlandoj de tiuj produktoj? c) Kiuj estas la praktikaj rimedoj por fordirekti tiujn troproduktojn k ilin dispartigi al la landoj, kiuj ne sufiĉe produktas da ili?

Unue ni rimarkigu, ke tiu nacia organizo okupiĝas ĉefe pri internaciaj aferoj ekonomiaj. Tri aliaj raportoj temis pri: 1. Praktikaj rimedoj por plifaciligi la vendadon de produktoj fabrikataj, nome pligrandigante la aĉetpovon de la landoj, kiuj ilin bezonas. 2. Doganaj k administraciaj rimedoj, kiuj povus helpi al internaciaj interŝanĝoj. 3. Praktikaj rimedoj por ebligi, en pli bonaj kondiĉoj, la cirkuladon de krudmaterialoj devenantaj de Eŭropo, inter la diversaj ŝtatoj, k pli bona utiligado. Estas klare videble, ke la kvar raportoj tuŝas la ĉefajn ekonomiajn demandojn de la nuntempo.

Pri la agrikultura raporto estis dirite: "La demando pri agrikultura troproduktado estigas tiun pri internaciaj kontraktoj *ĉu geografiaj, ĉu limigataj al iu kulturaĵo.*" Evidente, oni ne povas diri pli krude, ke la produktado k disvendado de terproduktoj dependas nur de geografiaj kondiĉoj laŭ la produkto konsiderata. Por kio helpas do la mond-dividiĝo je nacioj? Ĝi nur estas baro al racia organizado, k la raportanto bone ekvidas tiujn malfacilaĵojn.

Poste li skribas: "Probable oni estos devigata komenci per geografiaj interkonsentoj mallarĝaj. La organizado estus efektive relative facila inter landoj, kies produktoj estas kompletigaj, nome inter Germanio k Francio. La unua povas ricevi tritikon, vinon, fruktojn, legomojn, bovojn. Ĝi povas vendi sekalon, porkojn, terpomojn. La organizado estus pli malfacila aŭ eĉ neebla inter konkurantaj landoj, ekz.: Francio, Italio k Hispanio, kiuj ĉiuj troproduktas vinon, fruktojn k legomojn."

Tiam ni povas konstati, ke la interkonsento estus pli facila laŭ la natura produkt-situacio inter la "hieraŭaj malamikoj" ol inter la tiam nomataj amikoj, nun pli k pli fariĝantaj siavice malamikoj[1]. Sed tion, kio estas racia, oni ne povas realigi pro cirkonstancoj tute fremdaj al la problemo, t. e. pro naciemegaj sentoj, kiuj akrigas la rilatojn inter la regnoj.

La situacia raporto diras poste: "Por tiu celo necesas krei en ĉiu lando reguligantan organizon por produktado k konsumado. Tiaj organizoj devus: a) scii pri normala produktkapablo, jaraj rezultoj, k produktokostoj en ĉiu regiono k por ĉiu kvalito; b) scii pri la konsumbezonoj, distingante la diversajn formojn: homa nutrado kun ĉiuj siaj subdividoj, besta nutrado, porindustriaj terproduktoj ktp.; c) scii pri la stokoj en landa k tutmonda merkato; daŭre studi la variadon de la grandaj merkatoj; d) *starigi antaŭkalkulojn,* korekti ilin laŭbezone, ktp."

Ne necesas, cetere, analizi la tutan raporton por ekvidi, kia estas ĝia tendenco. La agrikulturaj asocioj postsekvas la industriajn trustojn, kiuj jam de longe organiziĝis tute sendepende de la ŝtatlimoj k ĝenerale sin bazas sur la produktoj. Tiuj lastaj senpere dependas de la geografia — ne nacia — situacio, de la grundo k subgrundo. Aliflanke estas vere, ke, kelkfoje, la ŝtatoj penas vivigi iun industrion en plej maltaŭgaj naturaj cirkonstancoj, nur ĉar ĝi necesas por la t. n. "nacia defendo". Ni substreku, ke tio estas herezaĵo ekonomia k tre malhelpas al la racia produktado kiel al malpliiĝo de la varprezoj, malprofite je la proletaro.

La laste citata parto de la raporto

---

[1] Almenaŭ pri Italio k Francio.

pruvas deziron ordigi la ĥaosan produktadon. Verŝajne tiu deziro ne povos efektiviĝi. Cetere la verkanto ne kaŝas tiujn antaŭvideblajn malfacilojn, li prave skribas: “Probable ni *estos devigataj* komenci per mallarĝaj interkonsentoj“. Li ne diras, kial, sed ni ja scias, ke en tio kulpas la naciaj kontraŭecoj, kiuj tiom bone utilas al kapitalistoj por malhelpi la diverspopolan kunagadon revolucian, sed aliflanke parte malhelpas aŭ almenaŭ malfaciligas la kapitalistajn interkonsentojn tiom profitdonajn por ili.

Sur ekonomia kampo ni vidas do nur malprofiton en ekzisto de nacioj. Ĉar ekonomio havas gravan influon sur politikon, sur kulturstaton k ĝenerale sur la tutan vivon de la popoloj, ni povas konkludi, ke estus progreso senigi pli k pli la naciojn je iliaj propraj rajtoj k suvereneco, alirante tiel al pli racia organizado de la mondo, kiu povas esti nur sennacieca.

Kamil Ru (835).

SARDUJO

SAT-ano 15973

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 305/6, 309, 314.)

Stranga kostumo k tradiciaj moroj de l' sarda loĝantaro

Preskaŭ en ĉiu vilaĝo la loĝantaro adoptis sian apartan tradician vestmanieron. La plej karakteriza emo de la sardo estas la imito al ĉio, kio estis propra al siaj prapatroj. Ĉio, kion ne faris aŭ ne rekomendis liaj antaŭuloj, tio estas por li malindaĵo. Ĉiu konsideras siajn proprajn vilaĝajn morojn, kutimojn k vestmanieron superaj al tiuj de l' aliaj vilaĝoj. Kiam oni vidas fremdvilaĝulon, oni ne bezonas demandi lin por scii, el kiu vilaĝo li estas; lia vestmaniero ja konigas tion.

Unu el la plej karakterizaj vestmanieroj estas la stranga kostumo adoptita en pluraj vilaĝoj de l' norda parto de la insulo: tre larĝaj, blankaj pantalonoj el pura lino hejmteksita, kies malsupraj ekstremaĵoj apenaŭ kovras la genuojn. La ceteran parton de l' kruroj kovras nigra, pure lana gamaŝo preme butonumita k kovranta ĝis preskaŭ duono la supran parton de l' ŝuo. La pantalonon korpligas ia lanzono tute faldaĵita. Ruĝ-, verd- aŭ nigrakolora veŝto kun du aŭ tri vicoj da arĝentaj butonegoj preme kovras la bruston ĝiskole.

La kapvesto estas ankoraŭ pli stranga. Ĝi estas longforma nigra sako el lano, sufiĉe larĝa por povi konvene, preme surkovri la kapon ĝisfrunte. Surmetite, ĝi estas aranĝata laŭplaĉe: jen oni lasas pendi ĝin laŭdorse, jen oni kunvolvas ĝin sur la kapo mem.

Ankaŭ la virinoj, sub la jarcenta influo de l' religio, vestas sin tre maldelikate. Ilia plej luksa vesto konsistas el jupo el kruda lano, longa ĝis kalkanumoj, tute faldumita, k preme butonumita ĉe la talio; k el ia tre mallarĝa bluzo fermita per butonoj ĝis kolo, kun longaj manikoj ĝis pulso, kies malsupran ekstremaĵon ĉe la talio oni enmetas sub la jupan zonon. La kapon kovras ia silka tuko, ofte diverskolora, duope kunfaldita, tiel ke el ĝi rezultas speco de malregula triangulo, kies unu pinto pendas sur la nuko k la du aliaj estas kunligitaj sub la mentono, kovrante kun la kapo samtempe parte ankaŭ la du vangojn.

Tiel estas vestitaj ankaŭ la infanoj. Ofte oni povas vidi idojn vestitaj per la vestoj de siaj gepatroj. Mi mem ĝis aĝo de 15 jaroj estis ĉiam vestita per la malnovaj vestoj de mia patro aŭ de miaj pli aĝaj fratoj. Paro da botoj de mia patro, kiun li ne plu povis uzi pro mallarĝo, al mi utilis dum tri jaroj, kvankam mi estis nur dekdu-jaraĝa. Ĉar miaj piedoj estis tro malgrandaj por plenigi la por mi tre larĝajn botojn, mi por ne forperdi ilin, envolvadis ĉiam miajn piedetojn per ĉifontukoj k ligis preme la gamaŝojn per sufiĉe diketa fadeno. Ŝirmite kontraŭ la pluvo per la malnova pelta surtuto de mia patro, mi povis atenti pri la kaprinoj paŝtiĝantaj sur la kamparo.

Se iu ajn, inspirite de novaĵoj, provus adopti por si mem diferencan kostumon, li certe altirus sur sin unue severan admonon de la vilaĝa pastro, k sekve, ĝeneralan malaprobon k akrajn kritikojn de la tuta loĝantaro.

Ĉio, kio estas fremda al iliaj kutimoj, moroj k medio, estas ridinda, kondamninda k puninda. Mi memoras, kiam mi estis knabeto, ke dum festotagoj la junuloj el la vilaĝo kolektiĝadis sur la ĉefa placo, k kiam fremdvilaĝaj vojaĝantoj trairadis, pasante al aliaj vilaĝoj, aŭ revenante al sia, la kolektiĝintaj junuloj kriaĉegante postkuris la fremdulojn, ĵetante al ili ŝtonpecojn, ĝis ekster la vilaĝo. La malfeliĉuloj estis punindaj nur pro tio, ke ili estis fremdaj al nia medio.

Tiaj malamikaj k malmoderaj manifestacioj kontraŭ fremduloj, ĝis antaŭ la mondmilito okazis tre ofte k en ĉiu vilaĝo. Miaopinie tio estas vole nevole la sankta principo de l' patriotismo. Do, tiu, kiu diras “patriotismo“, diras “besteco“, ĉar ties principo estas nur besta. Fakte, ju pli la homo estas nescia, des pli li estas, eĉ nekonscie, patriota.

En la raporto de l' Redakcio al la 10-a Kongreso, alude al “Tagoj el mia Vivo“ estas dirite: “Ni hodiaŭ konsilas, ke oni iel imitu tiun raportmanieron sub jena formo: kial k kiel mi fariĝis anarkisto, komunisto, socialisto, sindikatisto, liberpensulo, ateisto k. s. La verkontoj havus tiel la eblon ne nur paroli pri cirkonstancoj de sia vivo, sed ankaŭ iomete pritrakti teoriajn, principajn demandojn. Ni insistas, por ke K-doj provu verki laŭ tiu nia sugesto.“

La malbonfaroj de l' eklezio

La religia spirito, kiu regas ĝenerale inter la sarda loĝantaro, estas unu el la plej potencaj instigiloj al malamo. La pastraro eluzas tiun fakton por starigi unu kontraŭ la alian. Ekzemple, preskaŭ en ĉiu vilaĝo estas preĝejoj sur la kamparo, k unu fojon po jaro la loĝantaro procesie transportas tien de la vilaĝa preĝejo sanktaĵon, al kiu ĝi estas dediĉita. Ofte okazas, ke tiu preĝejo estas lokita sur teritorio apartenanta al alia komunumo, kies loĝantaro, en interkonsentita tago, kunvenas ĉe tiun provizoran sanktejon por forporti la sanktaĵon al sia komunumo, ĉar — ili diras: la preĝejo estas sur nia teritorio, sekve la sanktaĵo ankaŭ devas esti nia propraĵo. Tion, kio okazas poste, oni povas imagi senpene, konante la militeman karakteron de l' antagonistoj... Post la kutima, kruelega interbatiĝo ĉiu revenas al sia domo kun la koro plena je malamo k ĵurante, ke li terure venĝos. Jen kiel la pastraro per la religio klopodas interfratigi la homojn. Sed la di-ministroj sur tero ekspluatas la kredemon de l' malfeliĉuloj ankaŭ aliel. Ofte okazas, ke ŝtelistoj forŝtelas bov- aŭ bovinparon al iu. Post vana longdaŭra serĉado li venas al pastro por peti lin, ke la ŝtelisto estu ekskomunikota. Por efike plenumi tian sanktan faron, la pastro kompreneble postulas de li grandan monsumon, aŭ donacon de terpeceto al la eklezio. Tiel la perdo por la malfeliĉulo ofte duobliĝas, ĉar lin priŝtelas du: peka ŝtelisto k sankta ŝtelisto, kiu estas la pastro. Aliaj, precipe bestobredantoj, kiam okazas epidemia formortado de ilia bestaro, iras al pastro por ensorĉigi la bestojn, por ke ne pliaj mortu. La pastro tute kontenta post ricevo de pli malpli grandeta monsumo, liveras al malspritulo malgrandan ĉifontukon kunvolvitan, entenanta la petatan rimedon, rekomendante samtempe, ke ĝi neniam estu malvolvita.

Sekve de tiom da malamikeco ĉiam reganta ĉe la loĝantaro, de tempo al tempo okazas krimoj, k tiuj krimuloj kompreneble fariĝas banditoj, kiuj estas protektataj de unu aŭ pluraj grandbienuloj. Ili fariĝas baldaŭ la plej bonaj gardistoj de l' bienoj, tial ke kiam riĉulo malamas alian, k ĉi lasta ne havas banditojn lin favorantajn, li estas devigata fali sub la venĝa povo de sia kolego.

Kiel ni vidas, inter la sensperta k maldelikata sarda riĉularo, malgrandskale okazas la samo, kio okazas inter la politike tre sperta, diplomata imperialista banditaro. (Daŭrigota.)

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Germanaj laboristaj salajroj k sindikata vivo

K-do 14 624 notas, laŭ "Kampfruf" (Batalvoko) n-o 38/1930, kiu ĉerpis la nombrojn el la ĵurnalo de l'(burĝa) Instituto por esploro pri ekonomi-cirkonstancoj (*Institut für Konjunkturforschung*), ke pli ol 15 milionoj da germanaj laboristoj ricevas jenajn semajnajn salajrojn:

3,4	elcentoj	ĝis 6.— mk. g.	
12,4	„	pli ol 6.— mk.	ĝis 12.—
16,8	„	„ „ 12.—	„ „ 18.—
14,8	„	„ „ 18.—	„ „ 24.—
9,1	„	„ „ 24.—	„ „ 30.—
7,8	„	„ „ 30.—	„ „ 36.—
36,2	„	„ „ 36.— „	

100,5 eraro en la gazeto).

Kompreneble nur la privilegiuloj, kiuj havas okupon. La tri milionoj da senlaboruloj enspezas nur proporcian parton de tiuj sumoj. La salajroj estas tarife fiksataj. La labortago malofte estas 8-hora, en grandaj industrioj kutime 9- ĝis 10-hora. Por plibonigo de l' tarifoj, gardo de l' "porviva minimumo" batalas diversaj sindikatoj. La plej grava, socialiste orientita sindikata unuiĝo estas konstante atakata de revoluciema malplimulto en siaj vicoj. La opoziciularo en lasta tempo transiris al kreo de propraj sindikatoj, ekz. la Berlina metallaborista opozicio post la kompromisa fino de l' granda oktobra striko. En tiu kunligo estas menciinda la fakto, ke la sindikatara centro de l' Internacio, kiu havis sian sidejon post la milito en Amsterdamo, laŭ decido de l' ĉi-jara internacia kongreso en Stokholmo translokiĝis al *Berlino*. Sekve de nun ne plu estas korekte paroli pri "Amsterdama Internacio".

Ĉe universitatoj en Italio

Komence de oktobro estis arestita en Genovo la universitata profesoro Rensi, verŝajne pro tio, ke en letero de la edzino, konfiskita de la poŝta cenzuro, troviĝis frazoj malamikaj al la reĝimo. Renzi estas unu el la plej eminentaj filozofoj en Italio, ĉefa reprezentanto de l' skeptika skolo filozofa; liaj verkoj estas tre disvastigitaj en eksterlando. Antaŭmilite li estis socialisto k redaktis la "Klasbatalon", kiu aperis en Milano, poste liberalulo. Samtempe kun li diversaj intelektuloj en Verono estas arestitaj.

La profesoro de psikiatrio k neŭropatologio Livio Prati estas senoficigita, laŭ sciigo el Milano de 15. septembro 1930, pro "neakordigeblo kun la ĝeneralaj politikaj direktivoj de l' registaro".

La enskribiĝo de l' universitataj studentoj al faŝistaj grupoj okazas de nun aŭtomate, kune kun la enlistigo ĉe la universitato. Ili havas la rajton je gravaj prezreduktoj en teatroj, sportarangoj ktp., sed estas devigataj aparteni al la milico. *Italia.*

ATENTIGO!

La K-doj, kiuj skribas al la Direkcio de SAT pri aferoj rilatantaj la gvidadon de la Asocio, estas petataj ĉiam konigi sian SAT-matrikulon, por ke ni povu kontroli, ĉu ili estas aŭ ne aktivaj membroj. Neniu forgesu, ke estas aktiva membro nur tiu, kiu abonas la oficialan organon "S-ulo".

Direkcio de SAT.

Ĉu oni volas deporti d-on Filipeti?

Sub tiu titolo la gazeto "Italia" esprimas sian timon pri la sorto de Filipeti, kiu estis socialista urbestro de Milano, ĝis la faŝistoj atakprenis la urbdomon. Lastatempe dufoje okazis al li domtraserĉo k aresto, sed poste oni reliberigis lin. Filipeti estas esperantisto, k la laborista esp. movado, ankaŭ SAT, estis siatempe sufiĉe fortaj en Milano. La tiea lab. grupo povis aranĝi siajn kunvenojn k kursojn ĝis la jaro 1923. Nur poste la faŝismo likvidis la movadon k disŝiris la interligon de l' italiaj K-doj kun la eksterlando.

Ekribelo en Peruo

Pro interveno de la policanoj ĉe laborista manifestacio okazis ekribelo en la kupraj minejoj de Malpaso. Ĉe la unua batalo la rezulto estis 15 mortigitoj (inter ili aŭstro k du usonanoj). La mineja direkcio alvokis la helpon de trupoj. Oni komencas forpeli la "fremdulojn". T.

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en "S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

Daŭrigo.

(Vidu n-ojn 312, 313, 315, 316, 317, 318, 319, 320)

Mi ofte rezonis, kial multaj miloj da homoj, legante pri la policaj fikrimoj, silentas, kial almenaŭ ne kelkiuj iel protestas, ĉar tamen kelkaj inter li estas riĉaj homoj aŭ personoj iom influhavaj. Ni eĉ konsideru partiemon, antaŭjuĝon. Sed tamen, se homo konstante legas pri tiaj fiagoj kun adreso k nomo, li do devas pensi, ke io en ĝi devas esti vera, ĉar aliel la gazeto ne riskus la publikigon; ke, kion ĉiam la policanoj asertas, ne povas esti vera, ke tiom da homoj havas la strangan pasion *al si mem piedbati la ventron, al si mem frakasi nazoston, al si mem elbati dentojn k okulojn, al si mem rompi brakojn k krurojn, sin mem tiel trakti ke la tuta korpo estas nur unu sanganta, pusa ŝvelegaĵo* ktp. Ĝis nun mi ne trovis sufiĉan klarigon pri la sinteno de tiuj miloj da legantoj, inter kiuj sendube estas ankaŭ honestuloj.

Kiel sintenas la sinsekvaj registaroj k la burĝa publiko al la juli-viktimoj? Inter la amasego da fiagoj pli ol dudeko (pli ol du dekduoj — diras la libro de *Braŭntal*) da kazoj de antaŭprimeditita murdo farita de policanoj, parte eĉ kun nomcito de la koncerna krimulo, apogitaj je atestantoj, estis konigitaj al la juĝeja estraro. Al la murdistoj nenio okazis. La ŝtata prokuroro faris nenian persekuton aŭ esploron. La plej fia el ĉio estas jeno: La policprezidanto solene dekoris la murdistojn per ordenoj! La grandindustriistoj k burĝaj komercistoj kolektis miliardojn por la policanoj. Oni aranĝis specialan feston, en kiu ĉiu pafinta aŭ fusilon portinta policano ricevis parte ian distingan ordenon aŭ promocion k krom tio ĉiu el la fusilportintoj ricevis monsumon el la kolektitaj miliardoj, "pafmonon" nomis ĝin la socialdemokrata "*Arbeiter Zeitung*" (Laborista Gazeto).

Estas nekredeble, en kia cinika, fia maniero dum k post la murdoj la ĝenerala, burĝa publiko sin esprimis k ankoraŭ hodiaŭ sin esprimas pri la juli-viktimoj k manifestaciantoj: "Ruĝaj kanajloj", "plenmeritita sorto", "malbenitaj fiulaĉoj", "dank' al dio, ke ni havas tian policon" ktp.

La ekskanceliero de Aŭstrio, Johano Ŝober (*Schober*), kiu estis policprezidanto en 1927 k kiu monpremiis k ordene rekompencis la murdistojn, estas pri ĉio priskribita tutplene respondeca. Li estas kulpa pro tiu murdo al pli ol 90 k la per*dumduma* kripligo aŭ vundo al proksimume mil homoj.

La sola homo, kiu ekster la socialisma tendaro publike, akuze levis sian voĉon kontraŭ la julia murdado k kiu tion faras ankoraŭ nun, estas la talenta sendependa k senmakula verkisto Karlo Kraŭs. En sia revuo "Die Fackel" (La torĉo) li faras tiun vere sanktan batalon sentime k neinfluite de iu ajn. Li estis ankaŭ la sola, kiu dum la tuta mondmilito kuraĝe k senlace, malkaŝe kontraŭbatalis la militon per sia revuo.

Tiu K. Kraŭs aranĝis k ankoraŭ aranĝas amaskunvenojn, kiuj laŭ okazo k laŭ amplekso de l' koncerna salonego estas ĉiam plenplenaj. Senĉese li publike akuzis la tiaman policprezidanton Ŝober pro falso de bon-

PROLETOJ EL ĈIUJ LANDOJ UNUIGU VIN!

Plenumo de supra devizo estas aspiro de multaj internacie batalantaj proletoj. Precipe esp. laboristoj tre proksimiĝas la solvon de tiu problemo. Multaj proletaj politikistoj jam ekkonis neceson *internaciskale* kontraŭbatali k neniigi la kapitalismon k ĝian ŝtatsistemon, k ke tiucele la batalantaro nepre devas kuniĝi, *unuiĝi*.

Kiel pensema homo rigardante la nunan staton de l' organizita laboristaro, oni sin demandas, ĉu iam estos ebla la unuiĝo de l' tuta kontraŭkapitalista fronto? Ĉie nuntempe okazas skismoj en la lab. movado, nuntempe eĉ ĉe la lab. esperantistoj. Miaopinie ni SAT-anoj tamen devus trovi respondon al la problemo pri unuigo de l' movado. Laŭ mia firma konvinko la skismoj estiĝas, unue ĉar la organizita laboristaro plejparte pensas, ke sufiĉas havi membrolibron k ne necesas plie mediti pri aferoj rilataj al la emancipado. Due, la plejmulto en iu organizo pensas: "Tio, kion *miaj* gvidantoj diras, certe devas esti ĝusta, ĉar ili ja estas multspertaj." Kaj ili tute ne legas alitendencajn konsiderojn nek aŭskultas alitendencajn oratorojn. Se la koncerna organizo estas partio, tiam la membroj iom post iom perdas la rilatojn al aliaj partioj aŭ politikaj grupoj, nur aŭdas k legas la opinion de siaj partiestroj k iĝas tiom *partikonsciaj*, ke ili kvazaŭ perdas la *klaskonscion*. Se tia partikonsciulo apartenas al kulturorganizo, li tute forgesas, ke li ja ne troviĝas en partio, sed en superpartia organizo, k li ankaŭ en ĝi ofte parolas same kiel en sia politika grupo, en kiu oni plej ofte nur insultas pri aliaj politikaj grupoj, k — la disiĝo komenciĝas. Certe sole la partikonscio (do perdo de klaskonscio) kaŭzas ĉiujn skismojn en la proleta kulturmovado. Mia alvoko direktiĝas al la SAT-anoj, formi veran fronton de kontraŭkapitalistaro en la kulturmovado.

Laŭ mia konvinko tiom da politikaj tendencoj ĉe la laboristaro estiĝis tial, ke unue la politikaj batalantoj ne sufiĉe konsideris la malamikon: la kapitalismon k ĝian subtenanton — ŝtaton, rigardis ilin tra diversaj malĝustaj okulvitroj k ĉiuj ne ekkonis precipe la *fundamenton* de l' kapitalismo k tial ne povis trovi unu solan vojon al emancipo. Nia agado nuntempe nepre konsistu en profunda studado k objektiva diskutado pri kapitalismo, ĉar nur tiam ni povas batali kontraŭ malamiko, kiam ni ĝuste konas ĝin. Aliokaze oni atakas iun, kiu tute ne estas nia malamiko k la vera malamiko staras malantaŭe observante k kompreneble ĝojas, se ne ĝi mem, sed iu alia estas trafita.

SAT-ano 6707.

Ekde januaro vi legos en

LA NOVA EPOKO

paĝojn el la antaŭmilita

Historio de l' laborista esperantista movado.

Abonu al tiu unika en Esperantio literatura revuo, eldonata de SAT! Jarabono sur la bazo de 4 mk. g. (3 mk. por SAT-anoj).

Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O. 27.

morala atesto favore al la eldevigistofiĵurnalisto Bekesi. Plie li akuzis Ŝober pro fiuzo de lia ofico k felonio. (? Red. En neniu vortaro trovebla.) En multegaj kunvenoj publikaj li invitis la policprezidanton, ke li lin akuzu k kelkan tempon antaŭ la forpaso de la leĝa tempa limigo por la akuzo, Kraŭs invitis Ŝober rapidi, por ne forpasigi la templimon. Sed vane Kraŭs provokis. Ŝober havas pli dikan haŭton ol la plej fortika, dikega rinocero aŭ hipopotamo: li ne akuzis Kraŭs.

Kraŭs ankaŭ verkis riman versaĵon pri Ŝober, kiun li kante deklamas en amaskunvenoj. Oni pensu, ke tiu persono, kiu kulpas pro morto k kripligo de tiom da homoj k silentas pri tiom gravaj, publikaj akuzoj, estis ĉefo de la aŭstria registaro!

Kiel nun sintenas al la juliaj murdoj tiuj, kiujn tio pleje koncernas, la vienaj gelaboristoj? Oni bone konsideru: la 15-an de julio 1927 multaj dekmiloj da ili partoprenis al la strat-manifestacio. Krome dum la tuta tago k ankaŭ dum la sekvanta multaj aliaj dekmiloj iris pro scivolemo aŭ aventuremo al la Justecpalaco por rigardi la brulantan konstruon. Aliaj miloj iris en aliajn partojn de Ringstrato proksime al la katastrofa zono aŭ en tiun regionon ĉe Ringstrato, kie fiagis la policanoj. Ankaŭ la 16-an de julio multaj miloj orele aŭ okule atestis absolute senkaŭzajn, senavertajn murdojn k kripligojn al senkulpuloj.

Konsiderante ĉion tion, oni certe ne troigas dirante, ke duono de la viena loĝantaro, ĉu per rekta ĉeesto, ĉu per rakonto de spertintoj aŭ sinsavintoj estis tirata en tiujn okazintaĵojn.

Malgraŭ ĉio tio, nun, post forpaso de nur tri jaroj, la homoj jam preskaŭ ĉion forgesis k ne plu pensas pri ĝi. Se tiel estas ĉe la burĝaro, la natura klasa kontraŭulo de l' laboristoj, oni ne bezonas miri, sed kiom ajn nekredeble: tio okazas ankaŭ ĉe la senperaj viktimoj: la klaskonscia viena laboristaro!

Mi fakte ne scias, kiom ajn terura sorto devus trafi la homojn, por ke ili ne forgesu. La mondmiliton ili jam tute forgesis k ankaŭ la teruregan, fiintencan julian buĉadon ili jam komencas forgesi. (Finota.)

MI VOLAS SCII...

Pri regoformoj

Respondo al K-do Latvo en n-o 311

Certe vi povas prijuĝi, ĉu iu regoformo estas pure monarkia, parlamenta, komunista. Vi nur bezonas klaran difinon pri regado. Esplorante laŭ la difino, vi trovos, kiu regoformo ekzistas. La manko de la metodo nur estas, ke multaj diversaj difinoj estas uzataj. Ekzemple, monarko estas laŭ la "Plena Vortaro" sendependa regnestro. Se efektive la regnestro estas sendependa, la regado tiusence estas monarkia. Sed en la "P. V.", vi trovas sub "Monarkio", ke ekzistas i. a. absoluta k konstitucia monarkio. Nun ankaŭ la regado de pli malpli dependa monarko en la konstitucia monarkio nomiĝas monarkia. La parlamenta rego postulas laŭ "P. V." leĝfaradon k voĉdonadon de reprezentantoj. Pura tia sistemo povas ekzisti same kiel sendepend-monarkia. Plejparte ekzistas miksitaj sistemoj.

Por plifaciligi la studon, demandu aparte pri enhavo k aparte pri formo. Komunista regado signifas efektivigon de komunismaj doktrinoj en la publika vivo; sed ĉu per monarkia aŭ parlamenta sistemo, tio estas per la nura celdifino ne dirata. Ĉu la estro nomiĝas imperiestro, reĝo, prezidanto aŭ diktatoro, la sistemo povas esti laŭ la enhavo ĉiam sama.

Homoj regas ŝtatojn, ne dioj aŭ cirkonstancoj. Homoj povas diktatore agi, respondece surpreni la taskon de estroj k per sia tuta persono alceli efektivigon de l' enhav-programo. Ili povas erari, ili povas plibonigi la regadon, sincere celkonscie regi, sed ili ankaŭ povas laŭ personaj inklinoj k simpatioj gvidi ŝtaton. La kontraŭo estas la demokrata sistemo, kie la efektiva gvidanto estas malfacile trovebla. La "reganto" ĉiam demandas "kion fari?" al la aro, kiu laŭ hazardoj pli malpli grandaj voĉdonas. Demokratio estas hodiaŭ plejparte kaŝo de kontraŭsocialismaj fortoj, plejparte kaŭzo de misregado, ĉar respondeca gvidanto mankas. *MOR (14 624).*

*

La demokratio estas regsistemo, kiu donas aŭ provas doni al la popolo la *iluzion* esti suverena. La iloj, kiuj kreas tiun iluzion, estas diversaj laŭ la epokoj k popoloj, sed la fundamento k la celo neniam ŝanĝiĝis. *Musolini.*

*

Kion signifas la vorto faŝisto aŭ social-faŝisto? Mi estas tre embarasita, ĉar en Germanio ekzistas la tielnomata "nacisocialista" partio, kiu estas tre reakcia; tre konata sub la nomo "faŝistoj". *Tiuj faŝistoj akre batalas* **kontraŭ** *la socialdemokrata partio.* Pro tio mi tre miris, ke oni nun nomas ankaŭ la socialdemokratajn laboristojn "faŝistoj". *(8384)*

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 19. — REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. — Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

El Informletero (peresperanta) de Unio de Militantaj Ateistoj (UMA) en USSR

Kiel progresis la kontraŭreligia instruado.

En sia laboro Ateista Unio multe atentas edukadon de siaj membroj k tiuj tavoloj de laboruloj, kiuj alproksimiĝis al la Unio. La vasta propagando k agitado — jen, per kiuj metodoj batalas UMA kontraŭ religio. Jen kiel problemoj pri kontraŭreligia instruado estas multe atentataj en laboro de la Unio.

La kontraŭreligia instruado kaptas ne nur membrojn de UMA, sed ankaŭ ĉiujn laborulojn, interesiĝantojn pri ateismaj problemoj, k dezirantaj tiudirekte ricevi tiun aŭ alian scion.

Reto de la kontraŭreligia instruado konsistas el ateistaj rondetoj, seminarioj, kursoj, kontraŭreligiaj laborist-kamparanaj universitatoj, k kontraŭreligiaj fakoj k cikloj en superaj lernejoj.

R O N D E T O J. Komenca ero en la ĉeno de kontraŭreligia instruado estas rondetoj, en kiuj la aŭskultantoj konatiĝas kun elementaj problemoj pri la ateismo. En ateista rondeto ĝenerale oni povas renkonti homojn, kiuj definitive ne foriris de l' religio. Ili vizitas ateistajn rondetojn kvazaŭ por ekzameni sian opinion pri religiaj k ateismaj problemoj. Ofte okazas, ke tiuj ĉi ŝanceliĝantaj fariĝas aktivaj ateistoj k foriĝas de l' religio.

Por la rondeta laboro Centra Konsilantaro de UMA eldonis 3 tipojn de kontraŭreligiaj lernolibroj: por laboristaj, kamparanaj k ruĝarmeanaj rondetoj. Krom la lernolibroj estas eldonitaj programoj k rekomenditaj listoj de kontraŭreligia literaturo, estas eldonataj diversspecaj lerniloj. Ateistaj rondetoj faras ne nur pure lernan laboron. Ili organizas ekskursojn en muzeojn, ekspoziciojn, kolektive vizitas teatron k kinon, k la plej instruitaj mem gvidas kontraŭreligian propagandon en produktejoj, vilaĝoj ktp.

Necesas memorigi, ke en la rondetoj oni okupas sin en libera de la laboro tempo; k ke en rondetojn oni akceptas ekskluzive laŭ la sendeviga principo. La statistikadon de la rondetoj UMA ne aranĝis. Malesto de statistiko estas klarigata per tio, ke ateista rondeto estas tiom disvastigata formo de instruado, ke ĝi estas ĉe ĉiu laborista klubo, ĉe ĉiu produktejo k en multaj vilaĝoj.

S E M I N A R I O J. Se ateistaj rondetoj liveras nur elementajn sciojn, la seminarioj preparas la aŭskultantojn por la praktika kontraŭreligia laboro: ili preparas propagandistojn, agitantojn k gvidantojn por ateistaj rondetoj.

Krom tio estas organizataj specialaj seminarioj el instruistoj de lernejoj, laboristaj fakultatoj k teknikaj lernejoj. Estas organizataj apartaj kontraŭreligiaj seminarioj por medicinaj laborantoj ktp. Ankaŭ en seminarioj oni studas dum libera de laboro tempo. Memkompreneble, ke aliĝo al seminarioj (ankaŭ kiel al rondetoj) estas ekskluzive propravola. Materie la seminario siajn aŭskultantojn ankaŭ neniel ligas.

K U R S O J. De la j. 1924/25 en diversaj lokoj oni komencis organizi kontraŭ-religiajn kursojn. Mallongtempaj kursoj por pli-spertigo de kontraŭreligia aktivularo estas praktikataj en la laboro de UMA. En la j. 1926 oni kalkulis 49 kursojn, en la j. 1927 ĝis 65, en j. 1928 — 89. Kursoj estas fondataj en subdistrikta, distrikta k respublika skalo. Ilia tasko estas respertigi laborantojn gvidantaj kontraŭreligian laboron, por pligrandigi ilian kvalifikon.

K O N T R A Ŭ R E L I G I A J U N I V E R S I T A T O J. Sperto de laborist-kamparanaj universitatoj montris, ke ili estas bonega rimedo por la amasa edukado al kontraŭreligia aktivo k por amasa kontraŭreligia instruado.

Programoj de la laborist-kamparanaj kontraŭreligiaj universitatoj estas skizitaj por 1, 2, k 3 jaroj, k enhavas ĉefe jenajn partojn: 1. Dialektika k historia materialismo (marksismo k religio). 2. Naturscienco k religio. 3. Historio de la ateisma penso. 4. Deveno de la religiaj kredoj k historio de religioj. 5. Taskoj k metodoj de kontraŭreligia propagando.

La kontraŭreligiaj universitatoj ekaperis en fino de 1928. Al somero de 1929 ekzistis jam 11 kontraŭreligiaj universitatoj. Dum vintro de 1929 ĝis 30 ni havas informojn pri 35 kontraŭreligiaj universitatoj. Instruado en tiuj universitatoj okazas ĝenerale 2—4 fojojn dum semajno, vespere, en libera de laboro tempo. En Moskvo estas organizita speciala kontraŭreligia radio-universitato.

*

En U S O N O kuraĝa grupo de geintelektuloj batalas sub direkto de sia prezidanto Charles Smith kontraŭ religio k ĉiuj formoj de superstiĉo. Per radioparoladoj, broŝuroj k flugfolioj oni klopodas penetri en malklaron regantan en tiuj ŝtatoj. Por la multnombra loĝantaro de hispana origino oni ne nur eldonis flugfoliojn: "La evoluo sen dio" k "La biblio en la pesilo" en angla, sed ankaŭ en hispana lingvo. SAT-anoj ekster Usono, kiuj interesiĝas ricevi tiujn flugfoliojn senkoste, ĉu en angla, ĉu en hispana, mendu kun sciigo pri ekspedmaniero al terorlandoj ĉe ano 13 607, Zeist, Nederlando.

Ateistoj el tuta mondo nepre subtenu nian planon

Dum la dua duono de januaro 1931 oni aranĝos en *Leipzig* grandan *Kultur-Ekspozicion* aranĝotan de la Interesasocio por Laborista Kulturo (IFA). Ĉi tiun ekspozicion ankaŭ partoprenos la Asocio de Proletaj Liberpensuloj, Leipzig. Por instali nian liberpensulan fakon ege instrue, ni petas la kunlaboron de liberpensulaj organizoj k unuopaj liberpensuloj. Subtenu nin per alsendo de materialo. Sendu gazetojn, librojn, broŝurojn, flugfoliojn, afiŝojn, bildojn, fotojn, insignojn, statistikojn, grafikajn figurojn, murgazetojn, objektojn kiel: rozarioj, horoskopoj, alumetoj, talismanoj ktp. Ĉion rilate al liberpensismo, kremacio, neortodoksa karito, religio, eklezio, okultaj sciencoj, sektoj, cenzuro ktp. sendu al suba adreso. Travidu viajn arkivojn, trastudu viajn protokolarojn k faru kopiojn pri interesaj aferoj el pli fruaj tempoj. Ĉar la materialo de la Kultur-ekspozicio estu fundamento por migranta kontraŭreligia ekspozicio, ni petas ĉe alsendo de materialo indiki, ĉu la materialo povas resti en la manoj de la gvidantoj de la liberpensul-ekspozicio aŭ ĉu la materialo nur estas donata pruntedone. Ĉiuj materialoj estos asekurataj.

Sendu vian materialon tuj al: Verband Proletarischer Freidenker, Ausstellung *Leipzig C 1*, Dösner Weg 23.

Esperantistoj Ateistoj traduku k enmetu la alvokon en via liberpensula gazeto aŭ landa esperanto-gazeto. Ne forgesu aldoni al via materialo negermanlingva, sur aparta folio, telegramstilan esperantan tradukon. Ĉiun helpanton ni rekompencos.

Kulturekspozicio IFA
Liberpensula Fako
Komisiite: Kurt Hubricht.

RAPORTO

pri la S A T-Liberpensula Fakkunsido okazinta je 5. aŭgusto 1930 en la kongresejo (neoficiala pro neĉeesto de iu komitatano de la Sekcio).

Post interŝanĝo de opinioj pri la agoj de liberpensuloj k pri religio la kunveno konstatas, ke en ĉiuj landoj la liberpensuloj havas gravegan taskon plenumendan, ĉefe la SAT-Liberpensuloj, kiuj povus esti la perantoj por la tutmonda liberpensularo. Ni do streĉu niajn muskulojn por kiel eble plej efike plenumi dece nian laboron. Al ni jam ŝajnas, ke ĉiu SAT-ano devus esti liberpensulo k pro tio esprimas la deziron, ke SAT-ano ne estu ano de ia ajn eklezio.

Ni bedaŭras, ke neniu komitatano ĉeestas tiun ĉi gravan kunsidon. Tio

TRA ESPERANTIO

Kiel instrui laŭ "Petro"?

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

Dua kunveno. — La instruanto estu la unua en la kunveno k ĉiam estu ekzemplo por la aliaj. Nun komenciĝas la parola metodo. La instruanto evitu paroli la nacian lingvon (nur la gramatikajn novaĵojn klarigante nacilingve). Li denove pritraktas ĉiujn objektojn en la ĉambro per simplaj frazoj, ankaŭ la kursanojn mem. Ekz.: "La ĉambro estas granda", "la forno estas malgranda", "K-do Kraŭze estas juna", "K-do Ŝulc estas maljuna" ktp. ktp. La instruanto nun citas la vorton "kia" kiel demandvorton. Li demandas: "Kia estas la ĉambro"? Komuna respondo: "La ĉambro estas granda" ktp. Li nun formas aliajn frazojn. Ekz.: "En la ĉambro estas forno", "Sur la tablo estas libro" k tiel li denove citas ĉiujn objektojn en la ĉambro. Oni lernas la vortojn "kio" k "tio". Per ili li denove prilaboras ĉiujn objektojn en la ĉambro k eĉ la vestojn de la kursanoj. Ekz. "Kio estas en la ĉambro?", "kio estas tio?" ktp. La kursanoj respondu komune: "En la ĉambro estas tablo", "tio estas bildo" ktp. — La instruanto skribu ĉiun novan vorton sur la tabulon; la kursanoj notu. La lernantoj jam lernis la esp. parolon k ĝojas pri la unua sukceso. Antaŭ lecionfino, la instruanto demandas, ĉu iu havas demandon (tion li devas fari en ĉiu kunveno); se jes, li respondu la demandojn k instigu aliajn ankaŭ demandi, ĉar la sperto montris, ke multaj ne riskas fari tion.

Tria kunveno. — Dum ĉi tiu kunveno la instruanto ripetas ĉiun materialon de la dua kunveno, intense prilaboras ĝin esp-lingve k per daŭra demandado instigas la kursanojn al respondoj. Dum tiu ĉi interparolado, la instruanto bone observu la klaran elparolon k akcenton de siaj lernantoj. Ĉiun eraron oni tuj klarigu. Ĉar la granda parto de la kursanoj estas lernema, oni aldonu en ĉiu leciono ion novan. La instruanto nun traktu la verbon en la estanta, estinta k estonta formo (legas, legis, legos" k. a.). La instruanto skribu kelkajn simplajn frazojn sur la tabulon. Ekz.: "La patro legas", "la patrino legis", "la knabo legos" ktp. (Oni klarigu la sufikson "in" k la vorton "kiu". Nun komenciĝas denove vigla demandado k respondado. Kiu legas, skribas, trinkas ktp.? La kursanoj laŭte respondu: "La patro legas", "la patrino legis", "la knabino skribos" ktp.

Kvara kunveno. — La instruanto denove ripetu la tutan materialon, traktitan en la tria kunveno, ĉiam bone observante la elparolon k akcenton. Oni lernigu nun la personajn pronomojn: mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili ktp. (en ĉi tiu kunveno la instruanto provizis sin per kelkaj diversaj fadenoj k koloraj paperstrioj). Tiujn ĉi objektojn oni uzu kiel instruilojn, por facile instrui la diversajn kolorojn k la pronomon "ĝi". Nun denove komenciĝas vigla interparolado per apliko de simplaj frazoj kun la pronomoj ĵus instruitaj k per la vortoj "kiu", "kia" k "kio". — Al ĉi tiu leciono la instruanto kunportis la lernolibron "Petro", pri kiu li jam atentigis, rilate la prezon, dum la tria leciono. Li klarigas la signifon de la graslitere presitaj vortoj en la unua leciono de "Petro" (parton jam scias la lernanto), per la nacia lingvo. La lernantoj faras notojn, por ke la sekvonta leciono pli bone funkciu.

Kvina kunveno. — Nur nun komenciĝas la instruado laŭ "Petro". La teksto de la unua leciono en "Petro" estas komune k laŭte legata unu- aŭ dufoje k poste ĉiu legas frazon, por denove kontroli la elparolon k akcenton.

Antaŭ la lego de l' teksto en ĉiu leciono la instruanto klarigu la en la leciono entenatan gramatikan novaĵon. Post profunda studo de ĉiu leciono la instruanto aranĝu dialogon per la demandaj frazoj, troviĝantaj sub ĉiu leciono en "Petro". Dum tiu dialogo la lernantoj fermu la librojn. Tiel la instruanto procedu ĉe ĉiu leciono. Antaŭ la fermo de ĉiu kunveno li klarigu la vortojn de l' sekvonta leciono k same ankaŭ la gramatikajn regulojn en la koncerna leciono. Plie en sekvonta kunveno li ĉiam koncize ripetu la lecionon antaŭe studitan, por ke tiu, kiu ne ĉeestis la antaŭan kunvenon, ne "perdu la fadenon".

Oni povus ankoraŭ multon skribi pri tiu temo, sed la loko de nia gazeto ne permesas ĉion detale citi k la pluan aranĝon k manieron de l' kursgvidado oni jam devas lasi al la instruanto mem, kiu plej bone povos juĝi pri cirkonstancoj k kvalito de sia lernantaro. Mi tamen kredas esti doninta kelkajn direktivojn al kursgvidantoj, kiuj intencas instrui laŭ "Petro". Se oni povus kunveni kun la kursanoj ĉiutage, tiam mi preferus instrui laŭ rekta metodo, ekz. kiel ĉe familianoj, sed bedaŭrinde, la laboristoj plej ofte nur povas kunveni unufoje dum la semajno; pro tio mi ŝatas apliki la miksitan metodon. *90.*

malebligas ĉiun kunsidlaboron. Tial devas ankoraŭ funkcii la nuna Komitato por prizorgi la aferojn de la SAT-Liberpensula Sekcio ĝis la venonta kongreso, k interrilati kun la landaj perantoj por ordigi la jaraferojn ktp. Ni esprimas la deziron, ke la proksima SAT-Liberpensula Fakkunsido estu pli vigle prizorgata de la Plenumkomitato.
Subskribis A. Moore, P. Miller, C. Rannud, O. Melton, J. Coll (prezidinto).

LA GRANDA DISVASTIĜO DE

PETRO

la kursa lernolibro por laboristoj laŭ la rekta, parola metodo **pruvas nedisputeble ĝian taŭgecon por la instruado.** En la formo de interesa, alloga rakonto kun klasbatala tendenco la komencanto lernas kun plezuro k laŭ modernaj principoj nian lingvon.

64 pĝ.
Prezo: 0,70 mk. g.

Administracio de SAT, Leipzig O 27, Colmstr. 1.

LA SKISMA MALSANO

Ĉe London-a SAT-Kongreso la estro de GLEA, K-do Vildebrand volis kredigi al ĉeestantoj, ke en GLEA kompartianoj bone k kamarade kune laboras kun ali-tendencanoj. Pri tiu "eraro" mi jam tie atentigis. Sed tiam ne jam estis tiom profunda la skismo en GLEA kiel nun. Post la GLEA-kongreso (paskon) fondiĝis *S*ocialista *E*speranta *A*socio en Germanio (pentekoston), pro malharmonio inter kom. k soc. K-doj. La novfondon de SEA tamen malaprobis multaj soc. K-doj. Sed la sinteno de l' estro k redaktoro (Vildebrand k Besler) de GLEA nevole, sed evidente, helpis fortigi SEA-on. Krome eksiĝis el GLEA aliaj grupoj k membroj, kiuj nun ne apartenas al iu centra organizo. La GLEA-gvidantoj ne informas pri vera stato de ĝisnunaj eksiĝoj. La raportoj pri distriktaj konferencoj parte estas tiaj, ke aperas tute falsa bildo pri la ĝenerala situacio antaŭ la okuloj de nepartoprenintoj. Tio kompreneble denove kaŭzas eksiĝojn de sinceruloj. La ĉefan motivon por tiu konflikto donis la partitendenca agado de la estro (Vildebrand) k redaktoro (Besler) per artikoloj aperintaj en la GLEA-organo "A. E." Protestoj de K-doj, grupoj k Plendkomisiono neniom utilis. Tial ni konstatas kiel sekvon la kompletan skismon en GLEA. La GLEA-gvidantoj ja konstante akcentis la neceson de unueca lab. esp. movado, sed ilia sinteno pruvas, ke ili aŭ ne estas konsciaj pri la signifo de l' vorto "unueca", aŭ ili konsideras la nekomunistojn kiel naivulojn. Se politikaj partioj insult-

egas unu la alian, nia esp. organizo ne rajtas fari la samon. Almenaŭ mi ne kredas, ke tiel ni racie servos al nia celo: disvastigi esp-on inter laboristaro. La politikaj partioj ofte ŝanĝas sian taktikon, kio kaŭzas miregon ĉe iuj. Jen ekzemploj: 1. Germana socialdemokrata partifrakcio devigis eĉ liberpensulajn anojn voĉdoni en landa parlamento por konkordato inter la ŝtato k katolika eklezio. 2. Komunista partio en regna parlamento germana voĉdonis por liberigo al faŝistaj murdistoj. Ambaŭ aferoj ne okazis pro principaj konsideroj, sed pro "taktikaj"! La rezulto el tiuj paradoksaj partiaj sintenoj estas denova interinsulto inter la diverspartianoj k iliaj simpatiantoj. Tia fakto pruvas al ni klare, ke nepartiaj organizoj, kiel ekz. nia esp-a, ne povas, *ne devas* esti gvidataj laŭ momentaj partiinteresoj — aŭ... okazas tiaj konfliktoj, kiaj nun okazis en GLEA.

La sama konfliktbazo ekzistas en SAT. La redaktoro de l' GLEA-organo, K-do Besler, volas kredigi al aliuj, ke li (k K-do Riĥter) kvazaŭ pro nura plezuro veturis al Moskvo. Sed tiuj, kiuj konas la "antaŭlaboron" de la kom-frakcio por la lastaj GLEA- k SAT-kongresoj, *scias*, kial tiuj K-doj ĝuste en tiu momento, kiam la kom-frakcio volis forpeli la SAT-direkcion ĉe la Londona Kongreso, veturis "plezure" al *Moskvo!*

La konkludo el tiuj aferoj: En GLEA la kom-frakcio atingis okupi la ĉefajn postenojn k eluzis ilin por siaj specialaj partiaj interesoj ofendante nekomunistan parton de la membraro. La rezulto: disfalo de relative forta organizo! En SAT la kom-frakcio volis "venki" same, sed fiaskis. Tial tiu frakcio decidis en Moskvo (kun germ. "gastoj" Besler k Riĥter), fondi "novan revolucian organizon"! Do, la kom-frakcio kaŭzas skismon, ĉu en GLEA per partitendenca konduto, aŭ en SAT per novfondo de konkura organizo!

Al sinceraj unuecfrontanoj en tuta mondo mi tial vokas: Gek-doj! Lernu el la GLEA-skismo, kiel oni povas detrui "racie" pene konstruitan organizon. Estas pli facile *konservi* unuecan organizon ol unuigi jam disiĝintan; tion instruas al ni la lab. movado. Tial evitu imiton! Malfermu la okulojn! Aktiviĝu k senblufe helpu realigi per esp-o la Marksan devizon validan por *ĉiu* proleto: "Proletoj tutmondaj unuiĝu!"

A. v. d. Heid, Dortmund.

Ĉu daŭros la mistifiko?

Ni jam publikigis, ke en Moskvo troviĝas por esti presataj je la konto de SAT jenaj manuskriptoj:

1. *Kosmopolita Ideo (proks. 250 pĝ.).*
2. *Ford aŭ Marks (Walcher), proks. samampleksa.*
3. *Rakontoj pri Kamparo (ukraina).*
4. *Kiel homo formis sian dion (Simmel).*
5. *Skizo pri ekonomia geografio Ĥorrabin, ĉ. 200 pĝ.[1]).*
6. *Pri naskevito (Fiŝer), amplekso "Biblioteko de Sennaciulo".*

La unua manuskripto troviĝas en Moskvo jam de 20 monatoj k K-do Demidjuk, por pravigi prokraston en la presado de tiu verko, diris en sia letero al la kongreso, ke ĝi ne estis "prespreta". Manuskripto ja povas neniam esti prespreta, se oni diskutas ties lingvaĵon. Almenaŭ neniu neos, ke en Moskvo troviĝas sufiĉe da spertaj esperantistoj, kiuj certe kapablas prespretigi tiun manuskripton. La motivo dirita por prokrasti la preson sekve estas tute senvalora. Oni cetere devas scii, ke tiun "neprespretan" manuskripton prizorgis la ortodoksaj K-doj Kolŝinski k Muravkin.

Pri la aliaj manuskriptoj ne estis menciata ia motivo por pravigi ties presprokraston. Dume, antaŭ 3 monatoj, ni eksciis, ke presiĝos verko, kiun ni tute ne konas: "Eŭgeno Onegin" (Puŝkin)[2]. Ni ne kontraŭis al la presado de tiu de ni nekonata verko, sed la agmaniero estas almenaŭ tre stranga k ni opiniis necese konigi la fakton, por ke la SAT-anoj povu juĝi pri la valoro de kelkaj asertoj. Necesas ja, ke oni sciu, kie troviĝas la "detruantoj" de SAT k — ĝiaj defendantoj.

DIREKCIO DE SAT.

Dank' al eldonhelpo per subvencio de l' Kongreskaso

vendiĝas je la prezo de nur *0,50 mk. g.* (sen plia membro-rabato) la

Protokolaro de la X. SAT-Kongreso en Londono

(3.—7. aŭgusto 1930).

interesa k instruplena dokumento, kiun ĉiu aktiva SAT-ano devus koni.

84 dense presitaj paĝoj. Form. 15×22 cm.

PARIS XX, 23, rue Boyer / LEIPZIG O 27, Colmstrasse 1.

[1] K-do Rublov asertis per poŝtkarto de 7. 7. 1930, ke tiu manuskripto estis sendata al Leipzig. Tamen la Administracio certigis ne esti ricevinta ĝin. Lasthore (je 11. XI.) K-do Rublov respondas, ke lia indiko estis *erara* k la manuskripto resendiĝis al la tradukintoj!! Ni nun esploras pri tio...

[2] Kvankam pasis 3 monatoj, de kiam oni informis nin pri la ekpreso de tiu verko, nun ni ankoraŭ ne scias, ĉu ĝi aperis.

ĈU VERE ESPERANTO PROGRESAS?

En rimarkinda artikolo sub supra titolo (en n-o 295) K-do Barrot malkaŝis al la SAT-anoj la realan situacion de la esp. movado en la mondo. Unuamomente tiu stato povus efiki al ni malkurĝige; sed se ni profunde pripensas la aferon, ĝi malkovriĝas al ni kiel natura vojo de evoluo. Esp-o ja ne estas ankoraŭ vaste konata k uzata kiel interlingvo. Aliflanke la eŭropanoj ne estas tiel interesitaj pri esp-o, ĉar ili jam posedas la latinan alfabeton. Sed ĉe la ekster-eŭropanoj la situacio estas alia. Por ili esp-o estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj.

oj, sekve eŭropanoj pli facile ellernas ĝin ol ekz. azianoj aŭ alikontinentaj indiĝenoj. Kiuj uzas la latinan alfabeton, tiuj havas lern-avantaĝon konsiderindan. Bedaŭrinde la ekster-eŭropanoj, kiuj ankaŭ uzas tiun alfabeton, estas tiom indiferentegaj al esp-o. La plejmulto el ili parolas la anglan lingvon k eble opinias aŭ esperas, ke ĝi fariĝu mondlingvo, same kiel cetere la sovetiano Ciolkovski (vd. n-on 294), kiu pensas, ke sufiĉas fonetike skribi la anglan lingvon por ke ĝi estu taŭga kiel mondlingvo. Mi ne kredas pri tiu eblo, ĉar la strukturo de l' angla lingvo estas tiom plena da mankoj k malfaciloj, same kiel tiu de aliaj nacilingvoj. Ofte samsonaj vortoj havas diferencajn signifojn: *lie* (laj) = mensogo, aŭ — kuŝi, aŭ *lye* (laj) = lesivo. La gramatikaj reguloj estas ofte arbitre rompitaj ktp. Kiom multe pli facila estas la strukturo k vortfarado en esp-o!

Se ekzistas ankoraŭ proporcia malforto de l' esp. movado en ekstereŭropaj regionoj, oni tamen jam vidas signojn pri iomaj sukcesoj ankaŭ tie. Mi iam legis, ke en Brazilio ekz. ĉe speciala ekzameno estas postulata scii tri fremdlingvojn: la anglan, francan k — aŭ la germanan aŭ *esp-on.* Eĉ se en proksima estonto esp-o fariĝus nur tuteŭropa (inkluzive Sovetio) interkomprenilo, kiel rezonas K-do Barrot, tio jam estus granda gajno k garantio por estonta mondpaco. Rimarkinde estas, ke kvankam ruslingvanoj ankoraŭ ne enkondukis oficiale la latinan alfabeton, tiom multaj sovetianoj ellernis esp-on k tiel kreas la ponton al okcidento. Ni ne fariĝu dubemaj aŭ malesperaj pri la sukceso de nia afero!

8070.

Ĉu kredeble?

Jenan leteron ni ricevis de K-do Verwijs (Roterdamo): "...k nun mi ankoraŭ, kara K-do, havas plendon. Ĉar mi estas maristo k ne ĉiam hejme, okazis, ĉar mi estis for dum septembro, ke iu ebria esp-isto vizitis mian edzinon proks. je la 23-a horo. Tio estas sendube tro malfrua, por fari vizitojn. Ĉiuj, kiuj havas cerbon povas kompreni, ke maristo ne ĉiam povas esti hejme k en la jarlibro estas klare presita, ke mi estas maristo. Ĉar mia edzino ne povas paroli esp., ŝi ne povis informi sin pri lia nomo, lando ktp. Ŝi nur scias, ke li estas blonda persono (kredeble ankaŭ maristo). Nun, K-do, mi volonte dezirus ne plu presigi mian nomon en la jarlibron. Kun saluto..."

Jen denove plendo, sed oni ja eĉ ne scias, ĉu tiu persono estis SAT-ano aŭ ne. Kontraŭ tia misuzo de gastigemo ni devas energie batali. Cetere, antaŭ ol akcepti iun SAT-membron, oni bonvolu kontroli la SAT-membrolibreton, ĉu ĝi estas en ordo, ĉu la kotizmarko por la kuranta jaro estas gluita. Ni

estas kunmetita el ĉefaj eŭropaj lingvspertis, ke iamaj SAT-membroj ankoraŭ legitimiĝas per la matrikulo, kvankam ili jam de kelkaj jaroj ne plu pagis la kotizon. Estas komprenebLe, ke ĉiu, kiu ne gluis la kotizmarkon por la kuranta jaro, ne plu estas membro. *Adm.*

TRA LA MOVADO ◆

KRONIKO

Ĉeĥoslovakio. Nova kurso kun 30 personoj, plejparte gejunuloj, en Elbogen-Loket. Nova grupo en Plzen (sekcio de modellignaĵistoj) kun 10 anoj. Kurso de tiu grupo kun 16 lernantoj; gvidas SAT-ano 14 382. En Plzen-Peklo kurso kun 10 p. — *SOVETIO. Rostov.* K-do Löw (6817), antaŭ nelonge veninta el Köln, parolis 20. 10. en klubo "Rabis" pri lab. teatro en Germanio. Trad. K-do Baranov. Ĉesto de tiu K-do multe helpas nian poresp-an laboron. (5458.) — *Kiev.* La ĉi tiea grupo plendas pri konduto de K-do Majroviĉ el Polio, kiu ne respondas al multnombraj skribintoj k daŭrigas presigi sian anoncon pri koresp-ado. Averto al la Gek-doj! — *SVEDIO. Göteborg.* Aranĝita de A. B.F. (Lab. Kleriga Asocio), okazis je 3. 11. provleciono laŭ Ĉe-metodo. Post paroloj de K-do Ekström k K. Cardell, prezidantino de l' Virina Pacasocio, faris sukcesan lecionon Ĉe-instruistino Pähn. Al la postaj kursoj aliĝis pli ol 200 p. (inter ili 35 geinstruistoj). La loka gazetaro favore raportis. (13 530.)

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La ĉeĥoslovaka ministerio por fervojoj, kies esp. prospekto k ilustritaj poŝtkartoj estis multe petataj de esperantistoj tra la tuta mondo, konvinkiĝis plene pri la seriozo de esp-o k decidis, ke estonte ĉiuj ĝiaj eldonaĵoj diverslingvaj por eksterlanda propagando estu ankaŭ eldonataj esp-lingve.

*

S-ro Ŝerer el Los Angeles, mondvojaĝanta kiel propagandisto komisie de la Internacia Centra Komitato de l' Esp. Movado, faris ĝis nun en Japanio 20 paroladojn antaŭ proks. 8000 personoj k 4 radio-lekciojn.

EL LA RUBUJO

Sub la titolo "La laborista esperanta movado atakas" iu skismigulo sub la pseŭdonimo *Batalanto* diras i. a. jenon en la germanlingva "IFA-Rundschau" (IFA-revuo), okt./nov. 1930: "La pliakriĝo de l' klasbatalo, la obstina batalo de l' laborista klaso kontraŭ ĝian malamikon, la kapitalismon, k ĝiajn helpantojn, la faŝismon k socialfaŝismon, elvokis ankaŭ en la laborista esperanta movado pliakriĝon de l' kontraŭecoj inter la anoj de l' diversaj tendencoj. En la prolet-esperantista tutmonda asocio SAT, kiu ĉe la fondiĝo baziĝis sur pure revoluciaj principoj k revolucia fundamento, hodiaŭ la kontraŭrevolucia ideologio de l' perfidaj gvidantoj ĉiam pli k pli evidentiĝas. La superpartiaj gvidantoj de tiu ĉi organizo provas per la plej diversaj metodoj gvidi la organizon en plena "neŭtraleco" k subtenas tiel ĉiujn etburĝajn k reformistajn elementojn en ilia kontraŭrevolucia batalo. La gvidanto de SAT k redaktoro de l' *Asocia organo,* E. Lánti, misuzas *Sennaciulo*-n ĉiam pli por malhonesta batalo kontraŭ Sovetion k la revoluciajn elementojn en SAT, sed precipe kontraŭ la komunistojn..." Ĉu plorige? ĉu ridige?...

RECENZEJO ◆

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Jack London, La Fera Kalkanumo. Tradukis *G. Saville* kun permeso de la vidvino de l' aŭtoro. Eldonis: SAT, 23, rue Boyer, Paris XX. 362 pĝ. Form. 12×19. Prezo: broŝ. 2,60 mk. g., bind. 3,50 mk.

Antaŭ ĉ. tridek jaroj aperis la Fera Kalkanumo, k tamen ŝajnas, kvazaŭ la aŭtoro estus ĝin nun verkinta: la nunan sociordon k reĝimon London priskribas kun ĉiuj bataloj por ilia plibonigo.

Kvankam la temo estas tiom serioza, la verkinto sukcesis ĉion prezenti sub formo tre alloga, agrabla k facile perceptebla. Oni legas ĝin streĉe, kvazaŭ romanon. La herooj, Ernesto Everhard (kun la ecaro de J. London mem!), Aviso, lia fidela, sindona kunbatalantino, la "viziojn" vidanta episkopo, la juna kaptita oligarko, la tipaj reprezentantoj de l' posedanta k de l' meza klasoj, estas prezentitaj en siaj agoj k antagonismoj kvazaŭ vivantaj personoj.

Jen verko, kiu devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto interesiĝanta pri sociaj problemoj k ŝatanta sekvi la riĉan fantazion de majstra aŭtoro, kia estas London. Ĝi meritas ankaŭ specialan atenton pro la bona traduko. K-do Savil faris grandan servon al nia afero. *S. G.—K.*

Esperanto - Lernolibro por popollernejoj, laŭ rekta metodo verkita de *Arthur Degen* (laŭ komisio de la Esp.-Asocio de Germ. Instruistoj). Unua parto: 1-a—2-a lernjaro. Eld. Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig. Esp. Fako. Kun bildoj de E. Kutzer. 67 pĝ. Form. 14×22 cm. Prezo: 2 mk g. (Mendebla pere de SAT-admin., Leipzig).

Degen estas konata kiel sperta pedagogo per la sukcesoj de sia poresp-a agado en lernejoj. Tiu ĉi presteknike modela metoda lernilo por infanoj (eĉ kun multkoloraj bildoj!) estas vere jam per si mem bona propagandilo. La enhavo estas perfekte adaptita al la spirito de pli junaĝaj infanoj; temoj primateriaj, zorga evito de abstraktaĵoj. Tamen laŭ sia *spirito* (ne nur laŭ la lingvo) la libro povus esti pli *esperanta,* malpli *germana,* pli originalo, malpli adaptiĝo al nacia medio; sen perfortoj k rigoroj komprenebLe! Ni esperas, ke ĉe la dua parto la aŭtoro priatentos tion. *N. B.*

Paroladoj de L. L. Zamenhof. Esperanta Universala Biblioteko, n-o 1. Kompilita de T. Sasaki. Eld. Japana Esp.-Asocio, Tokio. 103 pĝ. Form. 10×15. Prezo: 0,64 mk. g. Nenie, ŝajnas, la Zamenhofa ideo trovis pli fervorajn adeptojn ol en Japanio, se oni juĝas laŭ la enhavo de l' esp. gazetoj aperantaj en Japanio, kie oni ĉiam parolas kun entuziasmo k preskaŭ religia adoro pri la aŭtoro de esp-o. Ankaŭ la eldono de tiu ĉi volumeto signifas al la jap. esp-istoj pli ol simplan lingvan bezonon — estas kvazaŭ diservo. "La Paroladoj estas al ni, kiel la Biblio al la kristanoj", ni legas en la antaŭparolo. Kvankam tiuj paroladoj jam estas presitaj alie (en la "Originala Verkaro de Z." ĉe Hirt k. c.), ĉiam ilia represo k diskonigo pro ilia imitinda stilo k lingvo estas gratulinda. *N. B.*

Traktato pri la origino de l' Japana popolo, de *Motojuki Tokieda,* kun komentario de d-ro *Ramstedt,* esperantigita de *N. Hiraoka.* 16 pĝ.; form. 10,5×15. Japana Esperanto-Instituto, Ŝin Ogaŭamaĉi, Uŝigome, Tokio. Prezo: 0,3 sv. fk.

Ĉi tiu broŝureto interesa temas pri la prahistorio, pri la deveno de la Japana popolo k tre sagace la aŭtoro alvenas al la konkludo, ke la Japana popolo estas ia intermiksita raso naskita el la geedziĝo inter viroj de suda gento k virinoj de norda gento. La presiĝo estas bona, la stilo klara k korekta. H. B.

2. *Arbeiter-Olympiade in Wien 1931.* (2-a laborista Olimpio en Vieno 1931). Prospekto ilustrita en germ., *esp-a,* franca, k ĉeĥa lingvoj.

NIA POŜTO ◆

6707. — Artikolo k bildo aperos. — *Red.*

13 900. — Ni regule sendas al vi "S-ulon". Oni simple ŝtelas ĝin. *Adm.*

KORESPONDADO ◆

ĈEĤOSLOVAKIO

Sovetianoj! — 4 K-doj el Ĉeĥoslovakio serĉas lab. en USSR. Sovetianoj bonvolu helpi. (Ŝuisto 30 j., veturilfaristo 26 j., ŝpinisto 25 j. bakisto 19 j.). Informon sendu al: SAT, Kolmstr. 1, *Leipzig O* 27 (10 337).

FRANCIO

K-do Bedez, 9 Avenue Villemain, *Paris, 14,* kĉl, PK, PI, gaz.

GERMANIO

K-do Josef Kassel, Kanalstr. 29, *Münster in Westfalen,* kĉl, PM.

K-do Erhard Schade, Zaschendorfer Str. 16, *Meissen/Sa.* (komerchelpisto, 22 j.), kĉl. Resp. garantiata.

K-do W. Conrad, Siedlung 5, *Bad Salzbrunn, Krs.* Waldenburg, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI, fotoj.



Renkontiĝon

de 24. 12. ĝis 28. 12, 1930 en Harco (Mezgermanio) preparas M o r a v e c, Gross-Ottersleben (Bez. Magdeburg).

ENHAVO

	pago
Naciismo — Internaciismo	65—66
Sardujo	66
La klasbatalo tra la mondo . . .	67
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	67—68
Proletoj el ĉiuj landoj unuigu vin! .	68
Mi volas scii	68
Sennaciula Liberpensula Paĝo . .	69—70
Tra Esperantio	70—72
Korespondado	72

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)